UNUA KARESMA DIMANĈO -21a de februaro 2010

JESUO ESTIS KONDUKATA DE LA SPIRITO EN LA DEZERTON, TENTATE DE LA DIABLO – Komentario al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

Lk. 4,1-13

En tiu tempo, Jesuo, plena de la Sankta Spirito, revenis de Jordan, kaj estis kondukata de la Spirito en la dezerton dum kvardek tagoj, tentate de la diablo. Kaj li manĝis nenion en tiuj tagoj; kaj kiam ili finiĝis, li malsatis. Kaj la diablo diris al li: Se vi estas Filo de Dio, ordonu al ĉi tiu ŝtono, ke ĝi fariĝu pano. Kaj Jesuo respondis al li: Estas skribite: "Ne per la pano sole vivos homo".

Kaj kondukinte lin supren, la diablo montris al li ĉiujn regnojn de la mondo en momento da tempo. Kaj la diablo diris al li: Mi donos al vi la tutan ĉi tiun potencon kaj ilian gloron; ĉar ĝi estas transdonita al mi, kaj al kiu ajn mi volas, al tiu mi ĝin donas. Se do vi adorkliniĝos antaŭ mi, ĉio estos via. Kaj responde Jesuo diris al li: Estas skribite: Al la Eternulo, via Dio, adorkliniĝu, kaj al Li sola servu".

Kaj li kondukis lin al Jerusalem, kaj starigis lin sur la tegmenta pinto de la templo, kaj diris al li: Se vi estas Filo de Dio, ĵetu vin de ĉi tie malsupren; ĉar estas skribite: Al siaj anĝeloj Li ordonos pri vi, ke ili vin gardu,"kaj ankaŭ: Sur la manoj ili vin portos," por ke vi ne falpuŝiĝu sur ŝtono per via piedo." Kaj responde Jesuo diris al li: Estas dirite:" Ne provu la Eternulon, vian Dion".

Kaj fininte la tutan tentadon, la diablo foriris de li ĝis estonta tempo.

En la unua karesma dimanĉo por la liturgio la Eklezio proponas al ni la evangelipecon kiu estas konata kiel "la tentoj de Jesuo"; la evangelipeco estas eltirita el la Evangelio laŭ Sankta Luko, ĉapitro 4a, 1-13.

Por bone kompreni kion la evangeliisto volas prezenti al ni, ni devus forlasi la terminon "tento" ĉar per "tento" oni celas ion kiu instigas al malbono al la peko; kontraŭe, ĉi tie troviĝas nenio el ĉio tio. La diablo ne sin prezentas kiel kontraŭlo kiu instigas Jesuon al malbono, al peko, sed, kiel ni vidos, li sin prezentas kiel lian kunlaboranton, eĉ fidindan kunlaboranton, kiu konsilas al li ĉiujn manierojn por famiĝi kiel mesio, kaj li eĉ sin metas je lia dispono.

Nun ni vidu la tekston. "Jesuo, plena de Sankta Spirito", tio okazas tuj post la bapto kaj Li ricevis la Spiriton, nome la forton, la kapablon je amo al Dio, "Li revenis de Jordan kaj estis kondukata de la Spirito en la dezerton". Kial en la dezerton? Sankta Luko metas sian tutan verkadon sub la direktivo de la eliro de Jesuo. Jam estis okazinta antikva eliro kiam la hebreoj estis liberigitaj pere de Moseo el la egipta sklaveco por eniri la promesitan landon. Nun la promesita lando fariĝis lando de sklaveco el kiu Jesuo devas eliri kunportante kun Si la homamason por ĝin liberigi.

“Dum kvardek tagoj”, en la Sanktaj Skriboj la nombroj ĉiam havas figuran valoron, ili neniam havas matematikan aŭ aritmetikan valoron. La nombro kvardek indikas “unu generacion”. Tiu kiun volas prezenti al ni la evangeliisto, kiel ankaŭ celas la aliaj tri, ne estas tempa periodo limigita en la vivo de Jesuo, dum kiu Jesuo venkis en tiu konkurado kun la diablo kaj poste ĉio estas en ordo. Ne, la evangeliisto diras al ni ke la tuta vivo de Jesuo estis sub la signo de tiuj tentoj, aŭ, pli ĝuste de tiuj delogoj.

Do, la tuta vivo de Jesuo estas reprezentita de tiu ĉi nombro “kvardek”.

“Tentate de la diablo”, kiu estas la diablo? Se Dio estas amo kiu sin metas je la servo de aliuloj, la diablo estas la bildo de la povo kiu ĉion forprenas. “Li manĝis nenion”, ĉi tie ne temas pri fasto; la evangeliisto evitas la terminon fasto por ne pensigi al ni ke Jesuo estis praktikanta la religian faston, sed li diras ke “Li manĝis nenion en tiuj tagoj”.

“Sed kiam ili finiĝis, li malsatis”, sed tiu ne estas fizika malsato. La malsato de Jesuo estas io plia. Pli poste Jesuo diros en la momento de Sia pasiono, “Kun deziro mi deziris manĝi ĉi tiun Paskon kun vi, antaŭ ol mi suferos; ĉar mi diras al vi: Mi ne manĝos ĝin, antaŭ ol ĝi plenumiĝos en la regno de Dio”.

Do, la malsato de Jesuo, la homo plena je Sankta Spirito, estas manifesti tiun Spiriton pere de la plena donaco de Si mem, la plenumo de Lia surtera misio. Tiam jen alvenas la diablo, mi tion ripetas, kaj li ne alvenas kiel malamiko, sed kiel kunlaboranto, eĉ kiel fidinda kunlaboranto.

“Tiam la diablo diris al li: “Se vi estas Filo de Dio”, atentu, la diablo ne pridubas la filan rilaton de Jesuo al Dio, tute male, sed li diras: “ĉar vi estas la Filo de Dio, tiu estas la signifo, nome, “vi estas la Filo de Dio, uzu, do, viajn kapablojn je via avantaĝo”, “ordonu al ĉi tiu ŝtono, ke ĝi fariĝu pano”. Ĉi tie estas reeĥo el tio kio plurfoje estos ripetita al Jesuo dum Lia surtera vivo, pro tio ni diris ke ne temas pri limigita tempo, sed ke la tuta surtera vivo de Jesuo estas sub la signo de tiuj ĉi tentoj.

Kiam Jesuo, en Nazareto predikas en sinagogo, la homamaso diros al li “kuracisto, kuracu vin mem”, aŭ eĉ pli, kiam Li jam estas krucumita la regantoj diros al Li: “Aliajn li savis: li savu sin mem, se ĉi tiu estas la Kristo de Dio”. Jen la sama tento; ĉar vi estas la Filo de Dio uzu viajn kapablojn por vi mem. Ĉar Li estas la Kristo de Dio, la elektito de Dio, Li uzu Siajn fortojn por savi sin mem”.

Do, la unua tento estas uzi liajn kapablojn je propra avantaĝo. Kaj Jesuo respondas per peco eltirita el la Libro de la Readmono, “Ne per la pano sole vivos homo**”,** do ekzistas io pli grava.

La dua tento, “la diablo kondukis Lin supren” ‘supren’estas dirmaniero kiu indikas la dian sferon, do li proponas al Jesuo la dian kondiĉon, “la diablo montris al li ĉiujn regnojn de la mondo en momento da tempo. Kaj la diablo diris al li: “Mi donos al vi la tutan ĉi tiun potencon kaj ilian gloron; ĉar ĝi estas transdonita al mi, kaj al kiu ajn mi volas, al tiu mi ĝin donas”. La denunco de la evangeliisto estas drama, ne estas Dio sed estas la diablo kiu donas la povon kaj la riĉecon. Povo kaj gloro apartenas al la diablo kaj li ilin donas al kiu ajn li volas.

Ekzistas ununura kondiĉo: “Se do vi adorkliniĝos antaŭ mi, ĉio estos via:”, la povo, la riĉeco, la gloro apartenas al la diablo, kaj la diablo estas preta ilin doni eĉ al Jesuo, kial? Ĉar dum ekzistas povo ekzistas ankaŭ maljusteco kaj ne povos realiĝi la Regno de Dio. Do, la diablo estas tentanta, estas deloganta Jesuon per la alpreno de la povo kiu estas la vera peko pri idolkulto: uzi la povon por proklami la Regnon de Dio. La Regno de Dio oni ne proklamas per la povo, sed per la amo.

Jesuo respondas al li ĉiam eltirante frazon el la Libro de Readmono, **“**Estas skribite: Al la Eternulo, via Dio, adorkliniĝu, kaj al Li sola servu”, nome, la neakordigeblo inter Dio kaj la povo, inter la amo kiu fariĝas servo kaj la demono estas kompleta.

La lasta ŝanco kiu restas al la diablo estas konduki Lin en la Sanktan Urbon, en Jeruzalemon kaj li metas Lin rekte en la plej altan lokon de la templo kaj, dum li ripetas, per tiu nova delogo: “Se vi estas Filo de Dio”, ni rimarkis ke en tiu kiu troviĝas en la mezo li ne ĝin proponis al Li. La tento pri povo kaj pri riĉeco ne gravas al iu ĉar Li estas la Filo de Dio, ĉar ĝi estas tento al kiu ĉiu homo (religiema aŭ ne religiema) cedas, kaj tion la diablo ja scias.

Al la tento pri riĉeco kaj povo malmultaj homoj sukcesas rezisti. Kaj ĉi tie, li, kontraŭe, diras denove: “Se vi estas Filo de Dio, ĵetu vin de ĉi tie malsupren”, nome, faru ion spektindan, eksterordinaran per viaj kapabloj, tiel la popolamaso kredos je vi. Kaj ĉi tie la diablo ŝajnas sperta majstro pri la Leĝo, fakte li citas la 91an Psalmon, du versegojn el ĝi, “Al siaj anĝeloj Li ordonos pri vi, ke ili vin gardu,” kaj ankaŭ: “Sur la manoj ili vin portos, por ke vi ne falpuŝiĝu sur ŝtono per via piedo”.

Do, ĉi tie la evangeliisto komprenigas ke sub la bildo de tiu diablo, vere sin kaŝas la majstroj pri la Leĝo kiuj tentos Jesuon. Kaj Jesuo ĉesigas la disputon. “Responde Jesuo diris al li: Estas dirite: “Ne provu”, nome, pli ĝuste: ‘ne tentu’, “la Eternulon, vian Dion”.

Kaj denove citinte la Libron de Readmono, Jesuo deklaras la plenan konfidon en la Patro. “Fininte la tutan tentadon, la diablo foriris de li ĝis estonta tempo. “Kiu estas tiu estonta tempo? En la Evangelio estas precizega peco, ĉe la ĉapitro 10a, 25a versego, kiam estos ĝuste majstro pri la Leĝo kiu tentos Jesuon.

La verbo ‘tenti’ denove aperos; do, tiuj ĉi tentoj ne estas izolita epizodo en la vivo de Jesuo, sed la tuta surtera vivo de Jesuo disvolviĝis sub la signo de la tento, de la delogo akiri la povon kaj la riĉecon por deklari la Regno de Dio. Sed Jesuo absolute tion rifuzis.